

Bulgara ESPERANTISTO



E N H A V O

* * *	5 jarojn Esperanto-kursoj por instruistoj	1
* * *	Granda aktiveco de la pacamaj fortoj en Bulgario:	
* * *	Publika packunveno en Sofia	2
Kalju Bjandov.	En Burgas — renkontiĝo de paco kaj amikeco inter la popoloj	3
* * *	Dumfoira esperantista packunveno	4
* * *	Junulara renkontiĝo en Koprivštica	4
* * *	Packunveno ankaŭ en Pamporovo	4
Pachatalanto.	Tutlanda packongreso en Bulgario	4
Rosica Georgieva.	E-kunvenoj de Asen Grigorov	4
Ĥristo Kurumilev.	Esperantistoj celebras Septembron	4
Nikola Aleksiev.	La partopreno de bulgaraj esperantistoj en la 58-a UK de Esperanto	5
Ĥr. Kurumilev.	Celebro de esperantistoj-veteranoj	5
Rajna Konstantinova.	Esperanto-plato en la Balkan-montaro	6
Krum Kjuljajkov.	Nikodim. Tradukis <i>Asen Grigorov</i>	7
Anton Strašimirov.	Rondodanco (fragmento). Tradukis <i>Simion Ĉirpanliev</i>	8
* * *	58-a UK de Esperanto:	
	Fakkunvenoj	10
	Internacia Somera Universitato	10
	Artaj aktivecoj	10
	Oratora konkurso	11
	Belartaj konkursoj	11
Boĵidar Leonov.	La 29-a TEJO-kongreso en Sarajevo	11
Volodja Ebelj.	XV-a Junulara Tutsovetia	12
Ljudmila Jevsejeva.	El letero	13
* * *	Nova grava priesperanta propaganda revuo en Hungario	13
* * *	Esperanto en granda germana gazeto	14
Hungara E-Asocio.	Oficiala anonco	14
* * *	Por la malgranda esperantisto. Gastas al ni „ <i>Juna Amiko</i> “	16
Jakov Vlasov.	Rozbukedo al la pereintoj (recenzo pri „ <i>Septembro estiĝos majo!</i> “)	16
* * *	Deziras korespondi	II
* * *	Nekrologoj pri PETR PETROV MARKOV kaj NINA SULJE	IV

Sur la kovrilpaĝo:

La prezidantaro de la packunveno en Sofio (vidu p. 2). Parolas la vjetnama poeto DAO ANH KHA — ĝenerala sekretario de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.

Abonkotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dolaroj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 lv. por sm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Carducci 32, Padova.
KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang P. O. kesto 16.
NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205, Bucuresti 1.
SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva V-449.
SVEDIO: Karl Krist, Deje, Box 109.



5 JAROJN ESPERANTO-KURSOJ POR INSTRUISTOJ

La bezono pri Esperanto-instruistoj estas akra por la tuta Esperanto-movado — enlanda kaj eksterlanda. Kaj unualoke: E-instruistoj el inter profesiaj instruistoj. Ĉar la profesiaj instruistoj estas pretaj pedagogoj, metodikistoj. Al ili restas nur ekposedi la lingvon.

Responde al tiu ege grava kaj aktuala bezono la Sofia Distrikta Komitato de BEA antaŭ 5 jaroj organizis E-kursojn por instruistoj — forestajn (dum la lernojaro) kaj ĉeestajn (20-tagajn, en la somero). Nun jam ilin organizias CK de BEA pere de sia Instruista Sekcio kaj Sofia Distrikta Komitato. Ekde 1973 j. la kursoj fariĝis internaciaj.

Dum la 5 pasintaj jaroj en la forestaj kursoj studis Esperanton ĉ. 670 personoj kaj en la ĉeestaj someraj — pli ol 600 personoj.

Kunigante la forestan kaj ĉeestan formojn, tiu instrusistemo montriĝis tre konvena por disvastigado de Esperanto inter la instruistaro. Jam dum la dua jaro ekfunkciis sub komuna gvido grupoj ne nur en Sofio, sed ankaŭ en kelkaj distriktaĵoj — Ŝumen, Veliko Târnovo, Plovdiv, Sliven, Jambol k. a., ankaŭ en Popovo. Tiel la sciamaj bulgaraj instruistoj eĉ en plej malgrandaj kaj malproksimaj loĝlokoj ekhavis la eblecon studi organizite la Internacian Lingvon.

En la daŭro de la lernojaro la kursanoj studas solaj laŭ speciala lernolibro kaj ĉiumonate preparas po du kontrolekzercoj. Fine de ĉiu monato ili kolektiĝas en la centron por unutagaj ĉeestaj lecionoj sub la gvido de siaj kursestroj, kiuj kontrolas, ĉu la lernita materialo estas jam bone posedata, forigas erarojn, ekzercigas la kursanojn kaj donas la plej gravajn momentojn el la materialo por la sekvanta monato.

Instruantoj en la someraj kursoj, krom bulgaroj, ĝis nun estis ankaŭ elstaraj E-pedagogoj kiel d-ro Istvan Szerdahelyi, Geza Kurucz, Zsolt Gjarmathy kaj Tibor Vasko el Hungario, Helmut Sonnabend el GFR. En 1974 venos denove d-ro Szerdahelyi kaj unuafoje Andrzej Pettyn el Pollando.

En la kadro de la someraj kursoj funkcias dusemajnaj E-seminarioj — por refreŝigo kaj plua perfektigo de la E-konoj.

Grava atingo estas la akiro de konstanta kursejo en Burgas. Ĝi estas moderna 4-etaĝa domo kun 2-3-4-litaj dormoĉambroj, apartaj lernoĉambroj, duŝejoj, komuna manĝejo kaj ĉio necesa por regula vivo kaj lernado de 160 kursanoj.

La instrulaboro fluas trankvile, ritme, laŭ difinita programo. La kandidatoj por diplomiĝo krom ekzameno de lingvo, metodiko kaj historio de la E-movado kaj literaturo havas praktikajn lecionojn, en kiuj ili demonstras siajn instrukapablojn.

Ĉiuj kursanoj — ĉiujare inter 130—150 personoj — laboras aktive, kun granda entuziasmo kaj obstino. Inter ili regas spirito de amika, nobla konkurado. Lerninte kvin horojn tage, la ceteran tempon ili pasigas sur la plaĝo, en promenadoj, ekskursetoj, konversacioj. Kreiĝas unuigita, entuziasma kolektivo, eu kiu regas preteco labori por Esperanto kaj la internacia amikeco, batali por la sankta afero de la paco en la tuta mondo.

Dum la 5 pasintaj jaroj la miksa sistemo de foresta kaj ĉeesta instruado de Esperanto al instruistoj montris siajn avantaĝojn, donis bonajn rezultojn, pruviĝis en la praktiko. En Burgas — Meden Rudnik formiĝis grava centro por preparo de E-instruistoj kaj kursgvidantoj. Tiu centro funkcias jam sub la alta aŭspicio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Devo de niaj distriktaj komitatoj, societaj estraroj kaj ĉiuj bulgaraj esperantistoj estas: konstante interesigi kaj varbi kursanojn el inter profesiaj instruistoj en nia lando kaj en eksterlando.

Devo de la Instruista Seĉcio kaj de la Sofia DK estas: surbaze de la ĝisnunaj spertoj plue plibonigi la organizan staton de la kursoj, plialtigi la nivelon de ilia metodika kaj instru-eduka laboro.

ORGANIZA VIVO

GRANDA AKTIVECO DE LA PACAMAJ FORTOJ EN BULGARIO

Lige kun la packongresoj en Sofio (26. IX. 1973) kaj Moskvo (25—31. X. 1973) en Bulgario okazis miloj da packunvenoj, konferencoj, renkontiĝoj k. a. La tuta bulgara popolo esprimis ankoraŭ foje sian firman volon defende al la tutmonda paco, amikeco kaj kunlaborado inter ĉiuj popoloj — kontraŭ la fortoj de imperiismo, faŝismo kaj ĉiaspeca reakcio kaj obskurantismo. Aparte ĝi esprimis sian ĝojon pro la komenciĝo de Tuteŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaborado kaj la kredon je ĝiaj bonaj decidoj serve al la paca vivo kaj feliĉo de la eŭropaj popoloj.

Grandan aktivecon montris ankaŭ la bulgaraj esperantistoj — sindonaj pacbatalantoj. Ĉiuloke la E-societoj organizis packunvenojn, ofte kune kun aliaj sociaj organizaĵoj, aranĝis ekspoziciojn, vitrinojn k. a.

Ĉi-sube ni donas informojn pri kelkaj publikaj packunvenoj kaj aranĝoj fare de esperantistoj.

PUBLIKA PACKUNVENO EN SOFIO

Organizantoj estis la Bulgara MEM-Komitato, la Sofia Distrikta Komitato de Bulgara

E-Asocio en kunlaboro kun la Urba Komitato de Patrolanda Fronto kaj la Urba Pacdefenda Komitato, kies prezidantoj ĉeestis la kunvenon. Ĉeestis ankaŭ Grudi Atanasov — prezidanto de la Nacia Pacdefenda Komitato, membro de la Tutmonda Pac-Konsilantaro, Nikola Aleksiev — prezidanto de MEM, k. a.

La kunveno estis malfermita de profesorino d-rino Lora Bakalova, prezidanto de la Urba Pacdefenda Komitato. Ŝi donis la parolon al s-ano Kimiaki Kurita, ĉefredaktoro de revuo „La Verda Kolombo“ — organo de la Japana Pacdefenda Esperantista Asocio (Japana Sekcio de MEM). Li faris interesan prelegon pri la batalo de la japana popolo kontraŭ la minaco de nuklea milito, pri ĝia aktiva subteno al la justa batalo de l'vjetnamaj patriotoj kontraŭ la usona agreso kaj nun — por la strikta apliko de la Pariza Kontrakto fare de la saĝona administracio kaj de la usona registaro, kiuj malkaŝe subtenas ĝin. Li notis ankaŭ la subtenon de la pacamaj fortoj en Japanio al la kunvoko de Tutmonda Packongreso en Moskvo.

La sekva oratoro estis la konata vjetnama poeto Dao Anh Kha — ĝenerala sekretario



de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA).

Emocie kaj verve li skizis la situacion en Ĥindoĉinio post la subskribo de la Pariza Kontrakto kaj la komuna Komunikado de la 13-a de junio j. k. S-ano Dao Anh Kha apelaciis al daŭra kampanjo helpe al la postuloj de DRV kaj la Provizora Revolucia Registaro de Suda Vjetnamio por strikta plenumado de la cititaj dokumentoj fare de Usono kaj Sajgono. Nur tiamaniere oni povas certigi veran pacon en Vjetnamio, normaligi la situacion en Laos kaj ĉesigi la usonan agreson kontraŭ Kamboĝo. La oratoro tuŝis ankaŭ la problemon pri liberigo de la 200 000 politikaj malliberuloj el la teruraj prizonoj de la sajgona administracio.

Salutparoladetojn faris ankaŭ pacamiko L.

Ŝpina el Ĉeĥoslovakio kaj F. Kosta el Portugalio.

La kunvenon partoprenis ankaŭ esperantistoj el Sovetunio, Pollando kaj Francio.

La kunvenintoj unuanime aprobis salutleterojn al la Internacia Preparkomitato por la Packongreso en Moskvo kaj al la Bulgara Pacdefenda Komitato. Speciala protestletero estis aprobita al la sajgona administracio por liberigo de la politikaj malliberuloj kaj por estimo al la demokratiaj liberecoj de la loĝantaro en Suda Vjetnamio.

*El n-ro 99/1973 de „Pacaktivulo“ —
perioda informilo de MEM
(kun mallongigoj)*

EN BURGAS — RENKONTIĜO DE PACO KAJ AMIKECO INTER LA POPOLOJ

Tiu interesa renkontiĝo estis organizita de Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto, Distrikta Pacdefenda Komitato, Distrikta Komitato de Bulgara Esperantista Asocio en Burgas. En la salono de la Sindikata Kulturdomo venis multaj pacbatalantoj el la urbo kaj la Distrikto de Burgas, el najbaraj distriktoj kaj multaj gekursanoj el la Someraj Instruistaj Kursoj en Meden Rudnik — Burgas. Inter ili estis ankaŭ multaj alilandanoj — el Sovetunio, Hungario, Pollando, Ĉeĥoslovakio, GDR, Rumanio.

La renkontiĝon malfermis k-do Janĉev, reprezentanto de la Patrolanda Fronto, kiu donis la parolon al la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ kaj membro de la Estraro de Centra Komitato de BEA Kunĉo Vălev — metodika gvidanto de la E-kursoj en Meden Rudnik. Li parolis tre emocie pri la lastaj sukcesoj de la pacbatalo kaj aparte pri la rolo de la esperantistaro en la batalo por paco kaj amikeco inter la popoloj. Lia parolado estis ofte interrompata de aplaŭdoj. Li parolis ankaŭ pri la decidoj de la MEM-konferenco en Beograd dum la 58 UK de Esperanto.

Poste la prezidanto de la renkontiĝo disponigis la parolon al ing. Manol Bonev — prezidanto de la Urba Popola Soveto, kiu salutis la ĉeestantojn je la nomo de Distrikta kaj Urba Popolaj Sovetoj, de Distrikta kaj Urba Komitatoj de Patrolanda Fronto. En sia salutparolado k-do Bonev diris, ke la partia, ŝtata kaj socia gvidantaro de urbo Burgas kaj ĝia distrikto tre alte taksas la batalon de la bulgara esperantistaro por paco kaj amikeco inter la popoloj. Ili tre pozitive taksas ankaŭ la fakton, ke en Burgas jam trian jaron oka-

zas Esperanto-kursoj por instruistoj.

Je la nomoj de diversaj naciecoj, reprezentitaj en la Someraj Porinstruistaj Esperanto-Kursoj en Meden Rudnik — Burgas, salutis la renkontiĝon per varmaj amikaj vortoj: Zsolt Gyarmati — hungaro, instruanto de metodiko en la kursoj, Maria Zasadna — polino, Otto Zeichert — el GDR, Linhardt Ryznar — ĉeĥo, Maria Kavankova — slovakino, kaj Kornelia Bilous Nagy el Rumanio. Aparte salutis la kunvenon ankaŭ soveta esperantistino, kiu gastis en nia lando.

Post la oficiala parto sekvis belarta programo. La ĥoro ĉe E-Societo „Nigra Maro“ kantis esperantajn, rusajn kaj bulgarajn kantojn. Ĝi estas fondita en la komenco de la nuna jaro kaj jam aperis antaŭ la urba kaj distrikta revuoj de la Kvara Festivalo de Amatora Arto, kie ĝi gajnis oran medalon. La ĥoro partoprenis ankaŭ la Recitalon de la Esperantaj Poezio kaj Kanto en Târgoviște en junio ĉi-jare, kie gajnis la premion de la Distrikta Popola Soveto. La ĥorestro Stefan Lalĉev estas laŭreato de kelkaj respublikaj festivaloj de l'amatora arto.

La danctrupo de la Ensemblo por Kantoj kaj Dancoj „Atanas Manĉev“ — Burgas, plenumis majstre popolajn dancojn kaj kantojn. La lernantinoj Moriana Văleva el Sofio kaj Zdravka Bobĉeva el Burgas recitis versaĵojn en Esperanto.

La aŭskultantoj akklamis tondre ĉiujn erojn de la programo. La tuta renkontiĝo de paco kaj amikeco inter la popoloj pasis bonege kaj laŝis daŭrajn spurojn en la animoj de ĉiuj ĉeestantoj.

Kalju Bjandov

Noto de la Redakcio. Pri tiu kunveno sciigis ankaŭ la ĉiutara gazeto „Rabotniĉesko delo“ (Laborista afero), organo de Bulgara Komunisto Partio (700 000 ekz.) en sia n-ro 231/1973



DUMFOIRA ESPERANTISTA PACKUNVENO

En Plovdiv dum la tagoj de la Internacia Specimena Foiro (2—10 de septembro) okazis tritaga esperantista renkontiĝo kun varia programo. Granda publika kunveno okazis en la salono de la Pupteatro. Parolis N. Aleksiev, prezidanto de BEA kaj MEM, pri la Septembra Ribelo de 1923 j.

En la belarta programo partoprenis per teatraĵo la geartista paro el Bulgara Esperanta Teatro Belka Beleva kaj Anani Anev.

La Radio kaj la gazetaro informis pri la kunveno.

La tuta tritaga programo de la Renkontiĝo estis inkluzivita en la kulturprogramo de la Foiro, kiu subvenciis ĝin.

JUNULARA RENKONTIĜO EN KOPRIVŜTICA

Komence de septembro ĉ. j. en la pitoreska urbo muzeo Koprivŝtica okazis junulara Esperanto-renkontiĝo, kiun partoprenis geesperantistoj el Sudokcidenta Bulgario.

Granda parto de la parolado de l'prezidanto de MEM N. Aleksiev estis dediĉita al la pactemo lige kun la du packongresoj — en Sofio kaj Moskvo. Krome, li tuŝis ankaŭ la okazintan antaŭ 50 jaroj unua en la mondo kontraŭfaŝisma ribelo en Bulgario.

PACKUNVENO ANKAŬ EN PAMPOROVO

En la alloga tre fama montara ripozejo Pamporovo (Rodopi-montaro) estis organizita Ora Esperantista Feriado, kiun partoprenis esperantistoj el Bulgario, Pollando, Sovetunio, Hungario.

La 22-an de septembro ĉi-tie okazis publika kunveno kun belarta programo kaj dancoj. Gasto de la feriantoj estis k-do N. Aleksiev — prezidanto de BEA kaj de MEM. Parolante pri la pachatalo li faris komparon inter la periodo post la Septembra Ribelo de 1923 j. en Bulgario kaj la faŝista puĉo en Ĉilio kontraŭ la demokratia registaro de d-ro S. Aliende. La kunvenintoj esprimis sian indignon kontraŭ la barbaraĵoj de la reakciaj generaloj kaj la starantaj post ilia dorso usona kaj internacia imperiista reakcio.

ESPERANTISTOJ CELEBRAS SEPTEMBRON

En septembro E-Societo „Roza Valo“ en Kazanlâk aranĝis solenan kunvenon lige kun la 50-a datreveno de la glora Septembra Ribelo de 1923. Raporton faris inĝenierino Svoboda Damjanova.

Unu el la vivaj partoprenintoj en la Ribelo — Stefan Georgiev — rakontis emocie rememorojn pri la ribelo en la regiono de Kazanlâk.

Estis prezentita literatura-muzika programo, en kiu Miljo Baev plenumis je fluto funebran serenadon de nia esperantisto-veterano Andrej

TUTLANDA PACKONGRESO EN BULGARIO

La 26-an de septembro en Sofio okazis la Naŭa Landa Packongreso. Ĉeestis 1200 delegitoj — reprezentantoj de laboristoj, kamparanoj kaj intelektularo. Kiel gastoj venis delegitaroj el la eŭropaj socialismaj landoj. Frunte de la soveta delegitaro estis la mondfama verkisto kaj poeto Aleksej Surkov.

Antaŭ la delegitoj faris entuziasman paroladon la ĝenerala sekretario de la Tutmonda Packonsilantaro kaj prezidanto de la Prepar-Komitato por la packongreso en Moskvo s-ro Romesh Chandra el Hindujo.

Post la raporto de la Nacia Pacdefenda Komitato kaj la debatoj oni aprobis kelkajn rezoluciojn kaj elektis novan Landan Packomitaton.

En la Prezidentaro de la Landa Packomitato estis elektita ankaŭ la prezidanto de Bulgara E-Asocio kaj de MEM Nikola Aleksiev, ĝisnuna membro de la Landa Packomitato.

Tiamaniere estis esprimita danko al la bulgara esperantistaro pro ĝia aktiva partopreno en la pachatalo de la bulgara popolo.

Pacamanto

E-KUNVENOJ DE ASEN GRIGOROV

La 25-an de septembro ĉ. j. nia altestimata E-poeto kaj publicisto Asen Grigorov el Sofio parolis antaŭ kunveno de gelernantoj en la matematika gimnazio de nia urbo Pazarĝik. Li rakontis interesajn rememorojn pri nia mondfama popola gvidanto Georgi Dimitrov, kies sekretario li estis dum kelka tempo post lia reveno en Bulgariion. Apartan intereson vekis la rakonto pri la pozitiva rilato de Dimitrov al Esperanto kaj la Esperanto-movado.

La vesperon de tiu tago li parolis je la sama temo antaŭ la poŝtistoj-esperantistoj.

La 26-an de septembro li havis kunvenon kun la lernantoj en lernejo „Georgi Dimitrov“ kaj la vesperon li parolis antaŭ la civitanoj en la Klubejo de la Kulturaj Agantoj.

Post la kunveno k-do A. Grigorov rakontis antaŭ la esperantistoj pri la agado de la Literatura Rondo en Sofio kaj proponis al ni ankaŭ fondi tian rondon. Ĉiuj akceptis kun ĝojo la proponon. La kunvenoj de la novfondita rondo okazos ĉiumerkrede, kune kun la parolanta rondo. Nun ĉiuj verkemaj samideanoj povos pli sisteme kaj fruktodone perfektigi kaj labori.

Granda ĝojo por ni estis la komenco de konstruo de propra Esperanto-klubejo en la centro de la urbo, sur str. „Gurko“.

Rosica Georgieva

Pânĉev, dediĉitan al Miljo Miŝev el v. Ŝipka, mortpafita de la faŝistoj en 1925 j. Ĥr. Kurumilev recitis versaĵojn.

Fine oni prezentis lumbildan parolantan ĵurnalon.

Ĥr. Kurumilev



LA PARTOPRENO DE BULGARAJ ESPERANTISTOJ EN LA 58-A UK DE ESPERANTO

Kiel sciante, la 58-a Universala Kongreso de Esperanto ĉi jare okazis en la okcidenta najbarlando de Bulgario — en la jugoslava ĉefurbo Beograd.

Ĉiuj objektivaj kondiĉoj permesis al la kongreso bone plenumi sian programon.

Por la sukcesa kongreslaboro kontribuis ankaŭ multaj bulgaraj esperantistoj, kiuj estis sufiĉe multnombraj. Jen koncize kion ili faris por la sukcesa realigo de apartaj kongresaj programeroj.

En la ses kunsidoj de la Komitato de UEA la bulgaraj membroj ĉeestis regule kaj partoprenis aktive la diskutojn kun propraj proponoj, plejofte akceptitaj unuanime.

En la Somera Universitato faris prelegon je temo „La fotogrametrio kaj ĝia aplikado“ la konata bulgara sciencisto prof. Vasil Peevski, membro de la Konstanta Komitato de Internacia Federacio de Geodezistoj. Li ĉeestis ankaŭ la kunvenon de sciencistoj.

La kunveno de la filologoj estis organizita sub la prezido de la veterano de bulgara E-movado Atanas D. Atanasov, vicprezidanto de Akademio de Esperanto. Li partoprenis ankaŭ la kunsidon de la akademianoj.

Ĉe la kunsidoj kaj kunvenoj de la instruistoj kaj filologoj tre aktivan kaj pozitivan rolon plenumis Kunĉo Vălev, ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj instruanto de Esperanto en la Sofia Universitato. Li partoprenis ankaŭ la konferencojn de esperantistopedagogoj en Maribor.

Ĉe la kunveno de agraraj specialistoj gravan rolon ludis Ŝterju Kukuŝev, specialisto pri tabakkulturado.

En la laboro de TEJO-kunsido helpis ĉe la preparo de dokumentoj pri la estonta kunlaboro de TEJO kaj UEA ing. Bojidar Leonov, kiu partoprenis ankaŭ la TEJO-kongreson en Sarajevo. Ĉe la junuloj aktivis Bojĉo Mladenov, instruisto kaj gvidanto de Lernanta Esperantista Societo „Verda Raketo“ en urbo Vraca.

En la laboro de la fakkunveno de fervojistoj partoprenis la supera scienca kunlaboranto en la Transporta Instituto de Sofio ing. Simeon D. Simeonov, bone konata en tiuj medioj, kaj Marin Marinov, vicprezidanto de Sofia Urba E-Societo „Maksim Gorkij“.

Ĉe la jurista fakkunveno la ĉefan prelegon faris la bulgara juristo Genĉo Genĉev, konata aktivulo de la Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj. Li traktis la temon pri socia asekuro en la mondo kaj speciale en Bulgario.

La kunveno de „Monda turismo“ pasis tre aktive. Oni reelektis por ĝenerala sekretario la bulgaron Nikola Nikolov, kaj por estrarano — la gvidanton de la Turista Komisiono de Bulgara E-Asocio Dimitro Motuŝev.

Ĉe la poŝtistoj aktivis la konata sofia esperantisto Draguŝko Petrov, oficisto en la Ministerio de Informado kaj Socialaj Servoj.

En la konferenco de reprezentantoj de landaj Esperanto-asocioj ĉeestis Stojan Kostadinov, sekretario de Bulgara E-Asocio.

El 31 infanoj en la Infana Kongreseto tri estis el Bulgario, inter kiuj Veselin Anev kaj Branimir Vălev, kiuj partoprenis aktive la belartan programon kaj estis tre bone akceptitaj.

La reprezentantoj de Beograda Radio kaj Televido, de Budapeŝto kaj Parizo surbendigis la programon de la bulgaraj infanoj kaj prenis de ili intervjuon je temo: „Kiel la bulgaraj lernantoj rilatas al la Internacia Lingvo“.

Bulgaraj geartistoj estis invitataj de LKK partopreni la kongresprogramon. En la Arta Vespero bone prezentis sin la aktora paro Belka Beleva kaj Anani Anev, delonge konataj al la internacia esperantista publiko. Ili prezentis la komedion „Familia matĉo“ de la bulgara aŭtoro Aleksandro Girginov kaj havigis al la spektantoj bonan humoron.

En la Internacia Vespero la operkantistino Maria Angelova kaj la operkantisto Karagjozov plenumis ariojn el konataj operoj kaj rikoltis grandan sukceson: la publiko kelkfoje vokis ilin sur la scenejon per insistaj aplaŭdoj. Kantis sukcese ankaŭ la konata estrada artisto Miŝo Zdravev, plenumante tradukitajn kaj originalajn kantojn en bona akompanado de ĉeĥoslovaka orkestro.

En la amase vizitita publika kunveno de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) faris raporton Nikola Aleksiev — prezidanto de MEM. Estis aprobita Deklaracio, kiu gratulas la ideon kaj la praktikan laboron por kunvoko de Tutmonda
(*Sekvas sur p. 7*)

CELEBRO DE ESPERANTISTOJ VETERANOJ

En u. Kazanlâk estis celebrataj la maljunaj kaj elstaraj esperantistoj-veteranoj de E-Societo „Roza Valo“ Asparuĥ Ivanov, Paŭn Nesterov, Deĉko Nikolov, Andrej Panĉev, Ĥristo Enev kaj Miŝel Ĉelibonov lige kun iliaj rondaj naskiĝdatoj — 70, 75 kaj 85 jaroj.

Raporton pri la vivo kaj agado de la veteranoj — socia, politika kaj esperantista — faris la prezidanto de la societo Dimo Mar-

tinov.

La veteranoj-esperantistoj ricevis donacojn.

Estis prezentita literatura-muzika programo.

La veterano-esperantisto Andrej Panĉev rakontis rememorojn pri la E-movado en la pasinteco.

La kunvenon ĉeestis ankaŭ la esperantistino Aŭgusta Boa el Francio.

Ĥr. Kurumilev



Ĉi-somere mi gastis al parencoj en vilaĝo Enina proksime de Kazanlâk. Ĉiutage mi kun mia edzo promenis en diversaj anguloj de la balkanmontara arbaro.

Iun tagon, tute mallonge antaŭ nia forveturo el Enina, ni decidis viziti la plej malnovan akvocentralon konstruitan en 1913. La vojeto kondukis nin supren, tra la arbaro. Dekstre bruegis la Enina-rivero, kaj ĝiaj akvofaloj plenigis la aeron per brilanta akvopulvoro. Kiam ni atingis la ponton, mi sentis min laca kaj decidis iomete ripozi. Antaŭ ni, inter la verdaj arkaĵoj de la arboj, blankis la akvocentralo. Mia edzo daŭrigis la marŝadon por kontroli, ĉu estas permesate viziti ĝin. Mi vidis maldekstre tablon kaj benkon el ligno. Malantaŭ ili — muro de maldikaj, originale zigzage interplektitaj vergoj. Mi faris kelkajn paŝojn por sidiĝi sur la benko. Subite antaŭ mi aperis la vorto „Esperanto“. Mi ne kredis al miaj okuloj. Ŝajnis al mi, ke mi halucinas. . . Sed farinte ankoraŭ unu paŝon mi klare vidis sur griza roko blankan marmoran platon. Sur ĝi — verda stelo kaj verda surskribo:

Al D-ro L. L. Zamenhof,
kreinto de Esperanto

Kvazaŭ ricevinta flugilojn mi grimpis sur la rokon. Apoginte min je dornohavaj branĉoj kaj herboj fine mi atingis la supron, kie blankis la plato. Mia koro bategis malritme, miaj manoj sangis, sed mia animo jubilis pro la ĝoja surprizo. Mi apogis min al la plato, premis vangon kaj brakojn al la malvarma glato de la marmoro. . . Kia trovaĵo! El la sino de la montaro, malproksime de la civilizacio, leviĝas tiu marmora plato, kun verda stelo kaj surskribo iomete senkolorigita pro pluvoj kaj sunlumo. . . Mi dronis en pensoj kaj meditoj. Kiu povus esti metinta ĝin ĉi tien? Kial mi neniam aŭdis ion pri tiu tiel interesa evento en la esperantista vivo?

— Dum mi sidis apud la Esperanto-plato kaj meditis, mia edzo revenis de sia esplorpromeno. Rimarkinte min sur la roko li demandis surprizita: „Kion vi serĉas tie? Kiamaniere vi sukcesis grimpi?“ Sed antaŭ ol aŭdi mian kla-


rigon, li legis la surskribon kaj estis ne malpli surprizita ol mi. Feliĉe mi havis en la mano du malhelruĝajn bonodorajn rozojn, kiaj abundis en la ĝardeno de niaj gastigantoj. Kun ekstazo mi lasis ilin antaŭ la platon. Mia edzo helpis al mi malsupreniri kaj ne ĉesis miregi, kiel mi, kun mia tiel serioze malsana koro, kuraĝis kaj sukcesis surgrimpi la rokon.

La sekvan tagon ni iris en la vilaĝan legejon kaj demandis la bibliotekistinon, ĉu estas esperantistoj ĉi tie. Ŝi respondis, ke en Enina ŝi neniun esperantiston konas, sed en la proksima vilaĝo Krân loĝas vigla esperantisto — Dima Martinov. Mi tuj skribis al li leteron kun invito viziti nin en la vilaĝo. Kaj li venis la saman tagon posttagmeze. Ni interkonatiĝis. Mi rakontis al li pri la emocia travivaĵo, kiu ne lasis min dormi tutan nokton. Kaj kia estis mia surprizo, eksciinte, ke li mem fiksis la platon tie en la nomo de Esperanto-Societo „Roza Valo“ en Kazanlâk, kies prezidanto li estas. Li faris tion en 1964 jaro, lige kun la 30-a datreveno de l'mortigo de la 18-jara esperantisto Ivan Grudev el Stara Zagora. En 1934, persekutata de la polico, Grudev kaŝis sin en la Enina—Balkano kune kun tri siaj kamaradoj. Sed unu el ili — Kiril Ĉolakov, estis perfidulo. Kaj en iu somera nokto de 1934 la tri junuloj, krom la perfidulo, estis murditaj de la polico proksime de tiu loko. Tridek jarojn poste k-do Martinov prenis la iniciaton honori ilin per la memorplato. Li intence metis ĝin proksime de la arbara vojeto, por ke pli multe da homoj — turistoj kaj aliaj, kiuj vizitas la malnovan akvocentralon, povu legi la surskribon.

K-do Martinov invitis nin viziti post du tagoj la solenan kunvenon de E-Societo „Roza Valo“ en Kazanlâk, dediĉitan al Esperantoploniroj. Ni veturis al Kazanlâk kaj vizitis la E-klubon, kie ni renkontis k-aon Martinov kaj la tre simpatian sekretariinon Ŝinka Geneva. Mi aĉetis belan vazon kaj posttagmeze denove iris kun mia edzo al la „Esperanto-angulo“ kun la E-plato. Grimpinte kuraĝe sur la rokon, mi metis la vazon kun buketo da freŝaj floroj malantaŭ la platon tiel, ke nur la floroj videbliĝis. Adiaŭe mi ĉirkaŭbrakis kaj kisis la platon kvazaŭ plenumante sanktan agon. Mi foriris, sed mi ĝis la fino de mia vivo vidis antaŭ miaj okuloj la blankan platon sur griza roko, kun verda stelo kaj E-surskribo, karesata de verdaj arbo-branĉoj. . . kaj mi aŭskultas la kanton de la akvoriĉa argenta Enina-rivero. . .

Mi konsilas al la esperantistoj, kiuj vizitas Kazanlâk, dediĉi horon aŭ du al agrabla veturo ĝis la Esperanto-angulo apud Enina.

Rajna Konstantinova



POEZIO kaj BELLETRO

NIKODIM*

de Krum Kjuljavkov

Nikodim ne havas hejmon,
mankas familio, dom' —
ĉion, ĉion jam cindrigis
de Septembro la pogrom';
cindro — panjo kaj edzino,
cindro — tri infanoj mem,
cindro — bonaj kamaradoj,
cindro — la gepatra hejm'.

Lian koron dissiritan
skurgas, batas venta vip',
etan, belan vilaĝeton
ruinigis malamik'.
En la tero de l'novalo
dormas senmortula ar';
tie falis en batalo
multenombra junular'.

Sed en la dezertaj kampoj
tra la fum', kiel fantom'
frapas per ĉevalaj hufoj
nevidebla eskadron';
tie flugas kun taĉmento
septembrulo Nikodim',
nokte sur ĉevalo nigra
rajdas la bravul' sen tim'.

Kuras birdoj, kuras ombroj,
preterkuras domtegment',
mil fajreroj altas, saltas
sub ĉevalo — ŝtorma vent'.
Flage flirtas koloharoj,
en okuloj — flama glim',
kiel vento de Septembro
flugas ĉie Nikodim.

Lin neniam trafas kuglo,
malamik' ne vidas lin,
kantas vento, kantas vojoj,
estas ĉie Nikodim;
kantas vento, kantas vojoj,
ĝemas la patrino kant',
tra vilaĝoj kaj arbaroj
galopadas la rajdant'.

Vojon faras la paŝtistoj,
panon donas kun bonvol',
glavon prenas kaj ekiras
la venkitoj, la popol'.
Glavon prenas kaj ekiras
filoj — multenombra ar',
kvazaŭ kantas la arbaroj,
kvazaŭ plaŭdas ŝtorma mar'.

Timo regas en vilaĝoj,
en vilaĝoj lumas am'.
Riĉaj kaŝas sin, malriĉaj
levas flagon en Balkan'.
Pasas en la domoj luksaj
de riĉul' kaj perfidul'
tagoj nigraj, maltrankvilaj,
tagoj plenaj de terur'.

Frue pordojn oni ŝlosas,
mallumiĝas dom', kaban',
sur la kampoj hele bluaj
flirtas flagoj — ruĝa flam',
tremas ombro ĉe l'rivero,
timvekiĝas dormemul',
krio fendas la silenton,
sonas forta hunda hurl'.

Poste — ĉio mallaŭtiĝas,
time mutas la kampar'.
En solejo silentiĝas
hufotrapoj de ĉeval'.
Galopado, hufbatado
malaperas ie for,
kaj aŭdiĝas kanto venka,
kanto venka — glavsonor'.

Super la novalo nigra
sonas krioj de batal'
kaj galopas en la nokto
apud la ĉeval' — ĉeval'.
Super la novalo nigra
tra l'fumanta malproksim'
flugas kun ribeltaĉmento
septembrulo Nikodim.

* Balado pri la tempo post Septembro 1923.

El la bulgara: Asen Grigorov

Kongreso de Pacamaj Fortoj en Moskvo en oktobro, kaj rekomendis partoprenon de speciala esperantista delegitaro. La kunvenintoj solene notis la 20-jaran jubileon de Mondpaca Esperantista Movado.

En la Literatura Konkurso honoran diplomon ricevis la membro de la Sofia Literatura E-Rondo Miĥail Ŝekergiev.

El tiu preskaŭ kronika konstato pri la

aktiveco de niaj esperantistoj en la laboro de la 58-a UK de UEA en Beograd estas videbla la deziro de la bulgara esperantistaro esti utila al la agado de la internacia esperantista movado por akiro de novaj, ankoraŭ pli okulfrapaj sukcesoj.

Nikola Aleksiev

Prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio



RONDO DANCŖ

de Anton Strašimirov

. . . Sed en la antaŭa korto kriegis virinoj. „Kial vi batas nin, hej!“ Hm, klare: oni igos ilin ĉeesti. La urbestro kaj la prokuroro kuris al la fasada balkono. En la blanka nokto konturiĝis malsupre dorsoj en policistaj jakoj: oni svingis vipojn kaj virina hurlo perdiĝis en la malantaŭa korto.

Onklo Nako enpikis la ungojn en la kobuton de Jaĉo kaj ektrenis sin kun li al la malantaŭa enirkoridoreto.

Malsupre, antaŭ la fruktoĝardeno, brilis la bajonetoj de la soldata kordono. La virinoj plenigis la malplenan lokon antaŭ ili.

Kaj la blanka nokto hirtiĝis: la soldatoj komencis klake malfermi la obturilojn de siaj fusiloj.

Ha-a!

Inter la ligitoj ekaŭdiĝis duonvortoj, poste singultoj. Kaj iu terure ekkriis:

— Oni mortigos nin, he-e-e-j!

Sed tuj ĉio mutiĝis: en la fruktĝardeno ekvidiĝis griza larĝperifera ĉapelo.

La maljuna ŝuisto Kapanov etendis kolon malantaŭen al sia filo:

— Sâ-sâbĉjo, oni mortigos nin, tial oni pelas la virinojn al ni. Memoru mian diron, ni ree parolos pri tio.

Sâbĉjo eksingultis. Kaj la maljunulo rekonsĉiigis:

— Hontu, Sâbĉjo! Tenu vin, filo mia! Ja viro vi estas!

Sed Sâbĉjo skuigis la tuta post lia dorso. Ne, oni ne facile mortas en jun-aĝo. Krome li atendas sian unuan infanon. Se lin oni almenaŭ lasus vidiĝin, kaj tiam. . . La maljuna ŝuisto komprenis tion. Hundaĉoj!

— Spiru profunde, filo mia! Jen tiel!

Kaj la ŝuisto enspiris forte. Sed Sâbĉjo nur elronkis sufokite. Hm! Li mortas antaŭ ol oni lin trapikus. La maljunulo piedpuŝis malantaŭen sian filon.

* El la fino de samnoma romano pri la Septembra Ribelo de 1923 j.

— Enspiru profunde, mi diris al vi, hundo! Nu, granda miraklo, se ni mankus en la mondo!

Kaj Sâbĉjo reakiris spiritĉeeston.

— Mi n-ne volas morti, pa-pa-pa-ĉjo!

— Ĉu vi ja opinias, ke mi volas mo-mo-rti? Sed mortis ti-tiom da homoj, Sâbĉjo. Eble oni vin ta-tamen ne bu-buĉos. Ja kio okazos, se oni buĉos ankaŭ junulojn, ja. . .

Sed de la apuda arbo ekkriis raŭke Magda, la servistino:

— D-dio mia, ki-kial oni buĉos min: mi ja estas vi-virinoo!

La maljuna Kapanov etendis kolon antaŭen: de la apuda arbo oni malligis la junan advokaton Darlenski. Ha-a, oni komencas!

— Sâ-sâbĉjo, oni komencas!

Kaj la okuloj de Sâbĉjo eliris el la orbitoj, liaj lipoj ŝvelis kaj krevis, li freneze ekkriis:

— Helpu nin, homoj, oni buĉas nin, he-ej!

La kriego, terura, bestsimila, fendis la blankan nokton. La maljuna ŝuisto komencis tordiĝi ĉirkaŭ siaj ligitaj manoj, la viroj, kiuj malligis la advokaton Darlenski de la apuda arbo, direktiĝis al Sâbĉjo. Kaj ŝtala voĉo eksonoris:

— Kiu kriegis?

Sâbĉjo ekbalbutis kaj ree elverŝis sovaĝan voĉon:

— M-m-mi. . .

La patro mordis sian langon: obtuza revolverpafo skuis la junan korpon de Sâbĉjo, kiu estis ligita post lia dorso. La maljuna ŝuisto streĉis sin kliniĝinte (lin sufokis la sango de la mordita lango), etendis kolon al la murdinto de sia filo kaj tutforte piedpuŝis malantaŭen.

La murdisto saltis for kaj fie insultis. Poste la tubo de la revolvero, nigra kiel serpento, ekfaŭkis ankaŭ kontraŭ la maljuna ŝuisto. La pafo estis



tutproksima — obtuza.

La blanka nokto ruĝiĝis.

La virinoj, premite ĉe la malantaŭa muro de la domo, kriegis kaj balanciĝis kiel kurteno kun makulitaj figuroj. Kaj antaŭ ili brilis la soldataj bajonetoj kiel funebraj kandelabroj...

La blanka nokto estiĝis flava: timige flavaj, kun faŭkantaj buŝoj, elstaris la trapafitaj kranioj el la amasego de la kadavroj.

Kaj la sango odoris.

La virinoj, pelitaj el la antaŭa korto, alvenadis laŭ la strateto, eligis malesperajn kriojn kaj ŝiris siajn harojn antaŭ la kordono de la soldatoj.

Ĉirkaŭbaris kaj densiĝis ilin viroj kun kaskedoj. Ree eksiblis la vipoj:

— Mutiĝu, vi!

Kaj la virinoj mutiĝis.

Tiam la garnizonestro, la urbestro, la prokuroro kaj ĉiuj aliaj alpaŝis la amasegon da kadavroj.

La kolonelo eltiris la sabron kaj kriis per ŝtala voĉo:

— Malbenon kaj kraĉaĵojn al la perfiduloj de la popolo poreterne! Kraĉu! Kiu ne kraĉos, tiun mi hakbuĉos surloke.

... Oni kraĉis.

Tiam per vipoj oni venigis ankaŭ la virinojn.

Ankoraŭ momenton — kaj ankaŭ ili komencos.

Sed la edzino de Kapanov furioze ekkriegis super ĉiuj kapoj—eble ŝi freneziĝis! — alta, kun taŭzita hararo, sanganta: ŝi ekfuriozis sub la vipoj.

— Hu-u-u, virinoj, he-e-ej! Kiu el vi kraĉos, tiun mi premsufokos!

Ŝi alpaŝis, levis alte piedon al la amasego de staplitaj kadavroj kaj enpikis la manojn en sian ventron. Ŝia voĉo estis raŭka, sed ŝi ekkriegis senespere kuraĝe:

— Ni ne kraĉos sur ilin, sinjoro ofici-iro, ĉar ni jen tiel ŝiris ilin de ni mem!

La vipoj senmoviĝis super la ekrintaj virinoj. Ektremis la kapoj kun la

kaskedoj. Mutiĝis ĉiuj. Kaj grandiĝis la amasego de la kadavroj — ekregis en la blanka nokto. Terure! Ĝis freneziĝo terure!

Kolonelo Ĝnojniŝki konsterniĝis kaj sin apogis per la pinto de sia sabro sur la tero. La klingo ekvibris kiel risorto. Tremis ankaŭ liaj kruroj. Li murmuriŝ ion. Versajne pripensadis taktikan retiriĝon.

— Bone. . . Ankaŭ vi pravas. . . Estu tiel: vi ne kraĉos. . . Bone. . .

Poste li skuis la kapon kaj kriis per diskanta voĉo:

— La muzikistoj! Ili tuj venu! Senpro-kras-te!

La virinoj interpretiĝis puŝate de la alvenintaj muzikistoj.

Ĝnojniŝki spiregis. Kaj ordonis:

— Rondodancon! Pajduŝko'n¹! Tuj!

Hirtiĝis ankaŭ la ĉielo mem: la muzikistoj ekludis. Kaj la etstatura kolonelo kun furioza mieno eksvingis la sabron:

— Urbestro, gvidu la dancon! Mi volas rondodancon! Aliĝu ĉiuj! R-rondodancon, mi diras al vi, aŭ per viaj kadavroj mi obstrukcos Marica!²

Sed la edzino de Kapanov — disetendinte krurojn, grandstatura, hirta — ekbalanciĝis kiel ebria. Kaj ekkriis:

— Murdu vi, hundaĉo! Murdu!

La etstatura kolonelo ree ektremis. Li tamen reakiris la spiritĉeeston kaj kaptis skurĝon de iu ĝendarmo.

— Rondodancu! — li maldece insultis ŝin.

Kapanov-edzino fleksiĝis, palpis sian denove sangantan kolon, hezitis iom. . . Sed tuj poste eklekis kiel tigrino kaj forte kaptis la manon de la kolonelo:

— Nu, sinjoro oficirooo! Saltu-u!

La edzino de Kapanov saltadis. La kolonelo piedpuŝis ŝin kaj sin deŝiris, sed ŝi saltadis: ludis. . .

Rondodanco.

La virino tordas manojn, batas surtere per la piedoj kaj kriegas:

— Ihu-u, vi tero nigra! Iha-a, vi tero dolĉa! Ihu-u! Iha-a! Nu, krevu

TRA LA E★ MONDO

58-a Universala kongreso de Esperanto

FAKKUNVENOJ

En la kadro de la Kongreso okazis multaj fakaj kunvenoj: de instruistoj, pachtalantoj, sciencistoj, agrikulturistoj, filologoj, aŭtomobilistoj, fervojistoj, juristoj, filatelistoj, matematikistoj, fotoamatoroj, delegitoj de UEA, kristanoj, bahaanoj, medicinistoj, militrezistantoj, junularo, muzikistoj, oomoto, poŝtistoj, radioamatoroj, ornitologoj, skoltoj, veteranoj, Semajno de Internacia Amikeco k. a.

Ĉiuj laŭ organizaĵo aŭ intereso traktis siajn fakajn problemojn kaj tiel kontribuis por la riĉa multflanka aktiveco de la Kongreso.

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO (ISU)

Rektoro prof. d-ro BOJIDAR POPOVIĆ, Jugoslavio. En sia inaŭgura parolado li parolis pri la unuecigaj kaj malunuecigaj procezoj en la hodiaŭa mondo.

En ISU okazis 8 prelegoj kun 1100 aŭskultantoj.

RALPH HARRY — ambasadoro de Aŭstralio en Bonn (FRG), preleginto pri Komerca Juro kaj pri Internaciaj Aferoj en la Aŭstralia Nacia Universitato kaj ĉefdelegito de Aŭstralio en la preparkomitato de UN por internacia kongreso pri marjura konvencio — prelegis je temo „Evoluo de la internacia juro pri la maro“.

HANS MAITZEN — doktoro de filozofio (astronomio, matematiko), scienca kunlaboranto de la Ruhr-Universitato Bochum (FR Germanio) pri „Oro kaj alkoholo en la Kosmo“.

vi — ihu-u! Krevu vi, malĉastulino tero, por engluti nin — ihu-u-u, iha-ha, hi-i-i³. . .

El la bulgara: Simeon Ĉirpanliev

¹ Pajduŝko — populara bulgara rondodanco.

² Marica — la plej granda rivero en Suda Bulgario.

³ Ihu, iha, iha-ha, hi-i — ekzaltaj krioj de dancantoj dum rondodanco.

GROZDEN SREDIĆ — asistanto en la Supera Fervoja Lernejo en Beograd — pri „Ekonomieco de transporto de varoj en konteneroj“.

RALPH A. LEWIN — profesoro pri mara biologio (Usono) — pri „Glitivaj mikroboj“.

VASIL PEEVSKI — profesoro de geodezio ĉe la Teknika Universitato de Sofio, eksprezidanto de la Centra Konsilantaro de la Scienc-Teknikaj Unuiĝoj en Bulgario — pri „La fotogrametrio kaj ĝia aplikado“.

WERNER BORMANN — docento en administra faka altlernejo kaj instrukomisiito por Esperanto en la Universitato de Hamburg — pri „Internacia komerco kaj valutoj“.

OTTO HASZPRA — kandidato de teknikaj sciencoj (hungaro) — pri „Modeleksperimentoj kaj modernaj helpiloj de la hidroteknika planado“.

AÜREL P. THEWREWK — prof. pri matematiko kaj fiziko en Budapeŝto — pri „Biblio kaj astronomio“.

ARTAJ AKTIVECOJ

JUGOSLAVIA VESPERO. Ĝi estis la plej impona, brila artarangĝo dum la tuta Kongreso. Riĉegan programon el dancoj de la jugoslavaj popoloj prezentis la Folkloro Ensemblo „Vukica Mitrović“, konsistanta el laboristoj de la plej granda konfekcia firmao de Jugoslavio — BEKO en Beograd. Tiu amatora ensemblo estas unu el la plej bonaj en la tuta lando kaj ĝi vere ravis la spektantaron kaj lasis ĉe ĝi neniam forgesiblajn impresojn.

VARIA VESPERO. La Drama Sekcio de la Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb prezentis du komedietojn.

La bulgara geaktora paro Belka Beleva kaj Anani Anev plezurigis la publikon per sia majstra ludo en la komedieto „Familia matĉo“.

La tria momento de la programo apartenis al japanaj amatoroj — kantoj kaj sporto.

Ankaŭ virina kant-grupeto el Budapeŝto sub la gvido de s-anino Rita Ingusz prezentis bukedon de divers-originaj kantoj el mezepokaj madrigaloj ĝis komponaĵoj de Bartok.

TEATRA VESPERO. La Drama Sekcio de la Studenta Esperanto-Klubo en Zagreb prezentis teatraĵon „Aŭtobiografio“ laŭ la konata verko de Branislav Nuŝić.

INTERNACIA VESPERO. En la unua parto de tiu kant-vespero prezentigis operkantistoj kiel Smyĉka (Ĉeĥoslovakio), Grabner (Aŭstrio), Zielenska (Pollando), Karagjozov (Bulgario), Dorde Minov (Jugoslavio). La publiko plej varme akceptis la dueton el la opero „La Barbiro de Seviljo“ de Rossini, kiun muzike kaj aktore tre bone prezentis la bulgara kantistino Maria Angelova kaj la ĉeĥa kantisto Smyĉka.



En la dua parto de la programo popolkantojn el pluraj regionoj de Britlando bone plenumis Margaret Hill, kiu akompanis al si per gitaro.

Simpatie prezentigis ankaŭ la ĉeĥoslovaka orkestro „Kvarteto Esperanto“, sen la troa bruo de la modernaj muzik-bandoj. Ĝi akompanis ankaŭ al la konata bulgara kantisto-esperantisto Mišo Zdravev, kiu plenumis estradajn kantojn.

Krom la supremenciitaj kongresarangoj okazis ankaŭ INTERKONA VESPERO, BALKEDO KAJ OFICIALA KONGRESA BALO.

Aparte menciinda estas la OFICIALA AKCEPTO fare de s-ro Branko Pešić — prezidanto de la Magistrato de Beograd, al 200 kongresanoj, reprezentantaj ĉiujn landajn asociojn, la Estraron kaj Komitaton de UEA k. a.

ORATORA KONKURSO

Ĉi-jare la temoj de la Oratora Konkurs, anticipe anoncitaj, estis:

1. Kion celas la hodiaŭa junularo?
2. Ĉu povas ekzisti internacia kulturo?
3. Lingvoj kiel portantoj de kulturaj valoroj.

4. La studentaro kaj la ĝenerala publiko.

Antaŭ 300 kongresanoj sur la podio aperis diverslandaj oratoroj, kiuj montris sufiĉe bonan nivelon. Jen la premiitoj:

I premio: s-ro Mac Gill el Nov-Zelando parolis je la temo „Kion celas la hodiaŭa junularo?“. Lia nomo estos gravurita sur la „Pokalon Ivo Lapenna“.

II premio: f-ino Kamiko Joda el Japanio —

parolis pri la sama temo.

III premio: Ian Carter el Britujo — parolis je la temo „La studentaro kaj la ĝenerala publiko“.

BELARTAJ KONKURSOJ

Partoprenis 56 aŭtoroj el 26 landoj, kiuj sendis 109 konkursaĵojn. Kvante — bona rikolto, sed kvalite — ne tre kuraĝiga. La premioj estis anoncitaj en la ĉeesto de ĉ. 250 kongresanoj. Jen la premiitoj:

ORIGINALA POEZIO (30 konkursaĵoj)

1. Nealjuĝita.

2. Lina Gabrielli (Italujo): „La vivo savita“.

3. Eduard Tvarožek (Ĉeĥoslovakio): „Dediĉo“.
- Laŭda mencio: Ueyama Masao (Japanujo): „La dezerto en iluzio“.

TRADUKITA POEZIO (23 konkursaĵoj)

Premioj ne aljuĝitaj.

ORIGINALA PROZO (26 konkursaĵoj)

1. Nealjuĝita.

2. Andreo Szabó (Hungarujo): „Velko en printempo“.

3. Jo Haazen (Belgujo): „Roza“.

Laŭda mencio: Mihail Ŝekerĝiev (Bulgarujo): „La okuloj“.

ORIGINALA DRAMO (8 konkursaĵoj)

1. Nealjuĝita.

2. Nealjuĝita.

3. Ludoviko Izák (Ĉeĥoslovakio): „La venkinta Ikaro“.

NOVA TALENTO (Pokalo Harabaĝiu).

Kjell Walraamoen (Norvegujo): „Ĉe vi“, originala poemo.

LA 29-A TEJO-KONGRESO EN SARAJEVO, JUGOSLAVIO, 21—27. 7. 1973

En daŭro de unu semajno Sarajevo — la gastama ĉefurbo de Bosnio kaj Hercegovino — estis ankaŭ ĉefurbo de la monda E-junularo. Tie okazis la 29-a TEJO-Kongreso, kiun partoprenis pli ol 250 junaj esperantistoj el multaj landoj.

La ĝenerala kongrestemo por diskutoj estis „Junularo kaj hom-medio“. La kongresanoj diskutis en diversaj studgrupoj, nome: aeromalpurigo; malpurigo de akvoj; malsato kaj manko de nutraĵoj; fizika detruado; ekspluatado de la naturaj riĉaĵoj — ĝis kiuj limoj; ĉu militoj kaj armigado servas al la estontaj generacioj; fremdiĝo de l'juna homo en la moderna urba medio; problemoj de etnaj minoritatoj en la junulara medio; la rolo de la Internacia Lingvo en la movado por konservo de la hom-medio kaj ĝenerale en la moderna internacia komunumo k. a. Okazis viglaj diskutoj fare de la kongresanoj. Mia opinio estas, ke ne sufiĉas tiaj ĝeneralaj diskutoj, preparitaj de la kongresanoj mem, kiuj ne estas

fakuloj. Eble pli utilis, se fakuloj prelegus pri similaj temoj, kaj poste la kongresanoj diskutu sub ilia gvidado.

En kunsidoj la komitatanoj diskutis pri diversaj organizaĵaj problemoj, ligitaj kun la agado de TEJO. Estis elektita nova estraro de TEJO kun prezidantino Flora Szabo (hungarino).

Distribuitaj en 10 grupoj la kongresanoj vizitis apartajn fabrikojn kaj konatiĝis kun ilia produktaĵo. Tie ili renkontiĝis kun la junularo. Mi vizitis Kojarski Kombinat en Vysoko. Ni restis kun bonaj rememoroj pri tiu vizito pro la gastameco kaj afableco, kiujn ni renkontis flanke de ĉiuj.

Estis faritaj ankaŭ kelkaj ekskursoj. Mi partoprenis la grupon, kiu vizitis Tjentište — la centron de la nacia parko Sutjeska. Tiu regiono estas kara loko por la jugoslavaj popoloj. Ĝi estas vera trezoro de netuŝita naturo, unika viva muzeo. Sutjeska famas en la nova jugoslava historio. Dum majo kaj junio 1943 j. ĉi tie okazis akraj bataloj de la ju-



La somero pasis, sed en ĉies koro ĝi lasis iun neforgeseblan rememoron. La plej grava somera evento en la vivo de l'junaj sovetaj esperantistoj estis la XV-a Soveta Esperantista Junulara Tendaro (SEJT-15). Ĝi estis organizita apud Riga-Golfo de Latvio, en la pitoreska loko Kesterĉiems.

La proksimeco de Esperantujo estis sentebla ja ĉe la Riga-Stacidomo. Tie kaj alie aŭdiĝis Esperanta parolado, ofte sonis la vortoj „Saluton, kamarado!“. Svarmis esperantistoj el tuta Sovetio: Leningrad kaj Tbilisi, Petropavlovsk-sur-Kamĉatka kaj Tallinn, Moskvo kaj Barnaul, Ufa kaj Kiev, Omsk, Ĉeljabinsk, Maĥaĉkala, Taŝkent, Klajpeda, Ivanovo kaj m. a. Ĉi-tien, en la profundan okcidenton de nia lando, venis reprezentantoj el pli ol 50 urboj.

La programo de la tendaro estis tre riĉa kaj vasta. Ĝi enhavis diversajn seriozajn, amikajn kaj sportajn erojn: funkciis Somera Universitato, kiun gvidis la d-ro de sciencoj Moskoviĉ; estis organizitaj paroligaj kursoj; interese pasis E-viktorino kaj konkurso de interpretistoj. La tendaranoj organizis helpon al agrikulturistoj: unu tagon ĉiuj laboris en la kampoj de la najbara kolhozo.

Ĉi-somere unuan fojon en la historio de la sovetaj E-tendaroj estis organizita kaj sukcese funkciis tradukista kurso, kiun partoprenis pli ol 20 personoj. La kurso havis pozitivajn rezultojn: la partoprenintoj ricevis elementajn sciojn pri la metodoj de tradukado, faris memstarajn provojn, konvinkiĝis pri la nekompareblaj simpleco kaj fleksebleco de Esperanto. Grandan helpon por la bona laboro de la kurso donis k-doj V. Aroloviĉ kaj V. Samodaj. Ili malavare transdonis sian sperton al la kursanoj.

La dua grava evento en la laboro de la tendaro estis la E-Universitato. La studentoj de l'Universitato konatiĝis kun la historio kaj la literaturo de Esperanto, la bazaj problemoj de la E-movado ktp. Fininte la Universitaton, la studentoj faros ekzamenojn kaj ricevos diplomojn. La Universitato enhavas kvar kursojn. Se en la ĉi-jara tendaro funkciis la 1-a kurso, en la sekva funkcios jam 1-a kaj 2-a ktp. Kiel

rektoro de la E-Universitato estis elektita la kandidato de la sciencoj S. N. Podkaminer.

Ne malpli interesa estis ankaŭ la amuza parto. Oni aranĝis kelkajn koncertojn, inter kiuj du por neesperantista publiko. En la programoj de la koncertoj estis kantoj, ŝercoj, pantomimoj, skeĉoj, eroj el la tendara vivo ktp. Oftaj eksplozoj de rido kaj aplaŭdoj esprimis la humoron de la publiko. Ĉu vi volus ekscii pri la ĉarmo de nokta naĝado en la maro kaj pri novaj rimedoj de batalo kontraŭ krokodiloj? Verŝajne vin ankaŭ interesos la vivo de esperantistoj en la paradizo? Do, vi devus viziti nian KGS-on (Klubon de Gajaj kaj Spritaj). Tio estas tradicia gaja tendara konkurado inter reprezentantoj de l'okcidenta parto de Sovetunio kaj la orienta. Tiun tendaran entreprenon oni atendas kun aparte granda intereso. Kial ne? Kio estas nereala en la vivo, tio povas efektiviĝi dum nia KGS. Ekzemple, ĉu vi povus renkontiĝi kun Ludoviko Zamenhof? Certe ne. Sed la partoprenintoj de KGS efektivigis tion kaj eĉ parolis tutan minuton kun la granda lingvokreinto. KGS havis brilan sukceson. Ĉi-jare en ĝi venkis la teamo de Oriento.

Korvarme estis renkontita la trupo de la Riga E-Klubo de Blinduloj.

Multaj sportaj konkuroj inter reprezentantoj de la samaj landaj partoj kaj inter esperantistoj montris, ke la esperantistoj scipovas ankaŭ sporti. Multaj homoj disiĝis kun ni firme decidinte ellerni la lingvon kaj veni en Esperantujo. En la memoro restis la noktoj, kiam la gejunuloj sidis en rondo ĉirkaŭ fajro, kies flamoj fabele lumigis la vizaĝojn, kaj la E-kantoj forflugis ankaŭ pere de gitaraj sonoj; nokta vagado ĉe la marbordo kun gitaroj kaj kantoj; nokta pilkludo ĉe helo de luno; nokta teo-trinkado ĉe fajro ktp. Ĉu eblas forgesi la minutojn, kiam Galja Lenskaja el Krasnogorsk rakontis pri la Tutmonda Junulara Festivalo en Berlin, kiun ŝi partoprenis kiel delegitino de Sovetunio? Ni tiel klare imagis ĉion al ni, kvazaŭ ni mem ĉeestis la festivalon.

Interese pasis la vespero de la E-poezio, dum kiu sonis kantoj, verkitaĵ kaj tradukitaĵ de

goslava partizana armeo kontraŭ hitlerana armeo de pli ol 120 000 soldatoj kun plej moderna armilaro. Tage kaj nokte la malamikoj atakis la 17 000 partizanojn, el kiuj 4000 estis vunditaj. Fine la partizanoj sukcesis eskapi el la sieĝo. Sed la prezo de tio estis karega: 1100 mortaj popolaj filoj kun la legenda jugoslava heroo Sava Kovaĉeviĉ. Nun en Tjentiŝte staras granda monumento kaj la junularo aktive laboras por konstrui modernan nacian parkon honore al la mortintaj herooj. Ĉiujare tie ĉi okazas laborbrigadoj. Bedaŭrinde, la vetero estis tre malbona kaj ni ne havis

eblecon promeni tra la bela praarbaro. Ni vizitis la muzeon, metis florkronon antaŭ la monumenton, renkontiĝis kun la estraro de laborbrigado „Sutjeska 73“.

La fama por la E-publiko teatra trupo de la Studenta E-Klubo en Zagreb kun gvidanto Mladen Ŝerment prezentis specialan programon antaŭ la kongresanoj. Bonege ludis la ĉeĥoslovaka kvarteto „Esperanto“.

Ĝenerale, la 29-a Kongreso de TEJO en Sarajevo estis bone organizita. Tio estas rezulto de la bona laboro de l'organiza komitato.

ing. Bojdar Leonov



niaj poetoj D. Lukjanec kaj M. Bronŝtejn, kiuj krome ankaŭ aktive organizis KGS-on. Ni aŭskultis originalajn versojn de docento B. V. Bokarev, de V. Čaldaev, N. Stolbun ka.

Dum unu el la lastaj tendar-vesperoj okazis festo de naskiĝintoj, pri kio respondis la barnaulanoj G. Jaskov kaj V. Jakovlev. La naskiĝintoj en aŭgusto estis apartigitaj, kaj tiuj „infanoj“ estis devigitaj eltrinki po botelo da lakto helpe de suĉilo. La „infanoj“ montris sin bravuloj kaj eĉ ne ploris! Unu-vespere okazis E-loterio, organizita de la esperantistoj el urbo Ufa, kies klubo ĉi-jare okupis la unuan lokon en la interkluba socialisma konkurado.

Ne lastan lokon en la tendara vivo okupis ankaŭ la kontraŭkrokodila batalo. Ĉiutage en matenaj kunvenoj estis enmanigata verda guma krokodilo al reprezentantoj de tiu urbo, kies esperantistoj plej multe krokodilis dum la antaŭa tago. La „krokodiloj“ estis primokataj en koncertoj, kantoj, versoj ktp.

Ni estis kune nur dum dek tagoj, sed kiom da amika varmece lasis tiuj-ĉi tagoj en ĉies koro! Kiom da novaj amikoj ĉiu akiris! La rememoroj pri la tendaro dum la tuta jaro varmigos la korojn. Ĉiu el la 250 partoprenintoj de la tendaro verŝajne ĵuris en si, ke la sekvontjaran tendaron li (ŝi) nepre partoprenos; kaj tio estas kredebla, ĉar por vera „verda“ koro ne ekzistas distancoj. Tion montris And-

ris Najtinŝ, kiu traveturis pli ol 10 000 kilometrojn de la orienta ĝis la okcidenta landlimo, de Kamĉatka ĝis Riga — por partopreni la tendaron.

La solena fermo de la tendaro okazis la 25-an de aŭgusto. La SEJM-komitatoj kaj reprezentantoj de urboj elkore dankis la tendar-organizintojn, post kio okazis enmanigo de memor-donacoj. La vesperon oni aranĝis la lastan balon, dum kiu estis elektitaj „Miss Esperanto“, „Mister Esperanto“, „Miss Krokodilo“ kaj „Mister Krokodilo“. Titolon de „Miss Esperanto“ ricevis la prezidantino de la Ufa E-Klubo N. Cveleneva, kaj „Mister Esperanto“ — la unua vicprezidanto de SEJM V. Aroloviĉ. En la konkurso de tradukistoj N. Cveleneva okupis la unuan lokon kaj entute ŝi tre aktive partoprenis la tendaran vivon.

La humoron de l'adiaŭa momento bonege esprimas la suba strofo de M. Bronŝtejn:

Venos de l'fajro sopira ekbril'.
Diros ni: „Ĝis revido, tendar'!“
Ĉiu ploretas, kaj eĉ krokodil'
ĵuras la lingvon ellerni dum jar'!

Ni disveturis al diversaj anguloj de l'granda Sovetunio, forportante en si amikan varmecon, aron da novaj kantoj, neforgeseblajn impresojn kaj firman decidon sekvontjare nepre denove veni en la tendaron.

Volodja Ebelj — Barnaul

El letero el Riga

EN RIGA ONI CELEBRIS LA SEPTEMBRAN RIBELON

„... La hodiaŭan literaturan seminarion ni dediĉis al la Septembra Ribelo lige kun ĝia 50-a datreveno. Mi havis la enkondukan vorton. Post ĝi ni prezentis al la aŭditorio fragmenton de la poemo de Geo Milev „Septembro“, la versaĵon de Krum Kjuljavkov „Nikodim“ kaj la prozaĵon de Angel Karaliĉev „Popo Andreo“. Kredu aŭ ne, homoj eliris la naztukojn kaj singultis. Mi prezentis al la ĉeestantaro la literaturan kajeron „Septembro estiĝos majo“ — oni ĝin akceptis per aplaŭdoj. Dankon al la bulgaraj gefratoj! Ĉe la fino O. Vetra rakontis pri sia vojaĝo en Bulgario.“

Ljudmila Jevsejeva

Vespero pri Bulgario

Riga Esperanto-Klubo aranĝos baldaŭ vesperon dediĉitan al Popola Respubliko Bulgario. Estos ekspozicio, prezentado de bulgara poezio, prozaĵ verkoj k. s. Bonvolu sendi salutleterojn k. a. al: Riga Esperanto Klubo, 226 098 Riga — C, pk. 499, Latvia SSR.

Ĉiu ricevos respondon!

Nova grava priesperanta propaganda revuo en Hungario

Ekde oktobro 1973 komencis aperadi revuo „ESZPERANTO MAGAZIN“, ĉefe hungarlingva, por tiuj, kiuj jam suferas pro la plurlingveco kaj interesiĝas pri la solvebleco de la nuna monda lingvo-problemo, sed ankoraŭ ne parolas la Internacian Lingvon. Ĝi aperos ĉiun duan monaton en 10 000 ekz. Granda formato, 32 paĝoj, kun kovrilo.

Letervespero en Rostock

La Esperanto-grupo, entute 40 esperantistoj kaj lernantoj en urbo Rostock, aranĝos letervesperon je la 19-a de februaro 1974 okaze de la Semajno de Internacia Amikeco.

Bonvolu sendi al ni viajn koresponddezirojn, librojn ktp. Ni garantias almenaŭ unufojan respondon aŭ alian rekompencan.

Skribu al: Sekretario de Distrikta Laborrondo Rostock de Kulturligo de GDR, Rostock 1, Kröpeliner Strato 25, Germana Demokratia Respubliko.



ESPERANTO EN GRANDA GERMANA GAZETO

Neue Berliner Illustrierte NBI. Die Zeit im Bild (Nova Berlina Ilustrito NBI. La tempo en bildo).

Tio estas la plej granda ilustrita semajngazeto en GDR kun eldonkvanto de pli ol unu miliono.

Jam en n-ro 11/1973 en NBI aperis favora artikolo pri Esperanto kun foto de la broŝuro „Junularo“, aperinta en Esperanto lige kun la monda festivalo de l' junularo en Berlin.

En n-ro 37/1973 aperis sur du bildpaĝoj (dua kaj tria) materialoj pri Esperanto sub komuna titolo „La lingvo de la verda stelo. Esperanto ne konas interpretistojn“.

Ĉar tiuj materialoj estas interesaj ankaŭ por niaj legantoj, ni donas ilin sur la paĝoj de „BE“ (iuj kun mallongigoj).

Esperanto internacia

Keikaj faktoj

Ĝis nun ekzistas ĉirkaŭ 700 proponoj pri mondhelplingvoj (i. a. Volapük, Ido, Occidental-Interlingue). Kiel sola ne historie estiĝinta lingvo Esperanto trovis internacie konsiderindan disvastigon.

En Kulturligo de GDR ekzistas 13 distriktaj laborrondoj Esperanto, kiuj gvidas politike, fakte kaj organize pli ol 60 laborgrupojn kun pli ol 130 rondoj.

En la mondo aperas 120 E-gazetoj, 72 eldonejoj aperigas periode E-literaturon kaj 16 radio-staciojn en 14 landoj vastigas disaŭdigojn en Esperanto.

En la baltaj respublikoj de USSR Esperanto estas instruata fakultative en multaj lernejoj.

En 1972 j. la Esperanto-Muzeo en Vieno disponis pri pli ol 17 000 titoloj de beletraj kaj sciencaj verkoj, inter kiuj libroj de Marks, Engels, Lenin, Goethe, Heine.

Dum la liberiga batalo de la vjetnama popolo, en Hanoj estis eldonitaj pli ol 60 titoloj de dokumentadoj kaj de liriko en Esperanto.

Ree de mondkongreso

Intervjuo da NBI kun Rudi Graetz — prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto de GDR, membro de la Internacia Komitato de MEM.

Ĉu Esperanto havas ŝancon fariĝi iam mondlingvo?

Kiel interkomprenigilo nepre, sed ĝi ne volas kaj ne povas anstataŭigi aŭ forpremi naciajn lingvojn, kiuj estas nedisigeble ligitaj kun la historio kaj kulturo de ĉiu popolo kaj stampitaj per naciaj apartaĵoj.

Ĉu Esperanto hodiaŭ jam estas larĝskale disvastigita?

La 58-an mondkongreson de la esperantistoj en Beograd, de kiu mi revenis en tiuj ĉi tagoj, vidis 1638 partoprenintoj el 42 landoj. La esperantistoj de Sovetunio kaj de aliaj socialismaj landoj ludis efikan rolon en tiu ĉi mondkongreso. Esperanto, jam tre disvastigita, sukcese estas metata en servo de la komuna socialisma afero.

Kunveno sen interpretistoj

Esperanto ĉe la Festivalo

Estis la kvara tago de la mondfestivalo en Berlin, 1973. En klubejo de Niederwall-strato sidis 200 knabinoj kaj knaboj el 14 landoj, diskutis pri la eblecoj de ankoraŭ pli intima kunlaborado en la kontraŭimperiisma batalo. La junuloj komprenis sin, nur la reporteraj bezonis interpretiston. Diris unu el ili: „Ĉe UNO estas pli bone, tie oni havas minimume kvin oficialajn laborlingvojn, kaj ĉe UNESKO ĉe ok — unu el ili oni ĉiam komprenas. Sed la amikoj ĉi tie havas nur unu lingvon.“

Tio estis la seminario de junaj esperantistoj el 14 eŭropaj, aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj.

Sur la foto: La Esperanto-veterano Ludwig Schödl (Ŝjodl) konatigis la „planlingvon“ jam antaŭ jaroj inter la instruistoj kaj la lernantoj de la supera lernejo de Neuruppin. Vaste etendiĝas eksterlanden la rilatoj de pioniroj kaj junuloj de Neuruppin, kaj en multaj okazoj Esperanto estas bazo por interkompreniĝo, rimedo por informado pri la socialisma konstruado de GDR.



Verda stelo kun morsa skribo

La filatelistoj povas jam glui en siaj albumoj 35 poŝtmarkojn, kiuj memorigas pri la iniciatinto de la monda helplingvo aŭ atentigas al kongresoj kaj aliaj aranĝoj de la esperantistoj.

La unua poŝtmarko en Esperanto aperis en 1925 j. en Sovetunio, kiam okazis la 6-a Internacia Proleta E-Kongreso en Leningrad. Apud la verda stelo, la simbolo de Esperanto, sur la poŝtmarko estas aldonita (sur la verda ĉirkaŭrando de la marka bildo) la eldona kaŭzo per morsa skribo (Henri).

Inter la materialoj sur tiu paĝo estas ankaŭ koncizaj artikoloj pri: d-ro L. L. Zamenhof („Elŝirita el la flamoj“) kaj Esperanto kiel lingvo (Simpla, sed ne primitiva) — ambaŭ de Detlev Blanke; versaĵeto de Hans Krause en germana lingvo kaj Esperanto.

La tuta tria paĝo de gazeto NBI estas okupita de kolora bildo, prezentanta k-don Rudi Graetz (kun lia edzino). Li montras la konservitan flagon de la laborista E-grupo en u. Rostock (Roŝtok). Antaŭ ili sur la tablo kuŝas E-eldonaĵoj, inter kiuj ankaŭ bulgaraj: „Sub la jugo“, „Bulgario“, gramofondisko de Miŝo Zdravec. La bildo estas akompanita de la jena teksto:

„Por mi Esperanto estis kaj estas parto de mia politika vivo. Per la Internacia Lingvo mi trovis fine de la dudekaj jaroj la vojon al la Germana Komunista Partio, per Esperanto-korespondado mi ekciis la veron pri Sovetunio.“

Rudi Graetz, kiu lernis Esperanton 12-jara, fiere montras la flagon de la Laborista Esperanto-Asocio, en kies Roŝtoka Infangrupo li agis 16-jara kiel „docento“. La roŝtokanoj flegis intiman kontakton kun sovetaj E-grupoj, uzis Esperanton en la intereso de sia klaso. Ekzemple en 1928 okazis konkurso inter la metal-uzino „Krasnij Sulin“ kaj la proletaj organizoj de Rostock, kiu estis organizita ekskluzive per Esperanto. Ankaŭ en la kontraŭfaŝisma rezista batalo Esperanto tiam ludis rolon (Gestapo opinis, ke Esperanto estas sekreta lingvo de la komunistoj). Konstruante sur revoluciaj tradicioj, la esperantistoj de GDR hodiaŭ kontribuas per sia lingvo por paco, popolkomprenigo kaj socialismo.

GRAVA!

Se iu ne sukcesis ĝustatempe aboni „Bulgaran Esperantiston“, li povas fari tion pere de la estraro de sia loka E-societo. La estraroj estas petataj sendi GRUPE la mendojn al la Redakcio!

OFICIALA ANONCO

Ni oficiale anoncas, ke Imre Székely (Szegeď, Hungario) ne estas membro de Hungara Esperanto-Asocio. Li ne rajtas organizi Esperanto-renkontiĝon en Hungarujo. Ni ne respondecas pri lia agado.

Hungara Esperanto-Asocio

Letervespero en Viljandi

Tradician letervesperon aranĝos baldaŭ la E-klubo en Viljandi. Ni petas sendi al ni amase pk, bk, leterojn. Al ĉiuj ni respondos per kolora bk.

Samtempe nia junulara grupo (12—30-jaraĝaj) serĉas korespondamikojn.

Ĉion sendu al adreso: USSR, Estonio, 202 900 Viljandi, pk. 33 — por la Esperanto-Klubo.



Gastas al ni „Juna amiko“

PONTO INTER EŬROPO KAJ
AZIO

Apud la plej granda urbo de Turkio super la markolo de Bosporo oni konstruas ponton. Ĝi kunligos la eŭropan parton de Turkio kun la azia. Tiu ponto ne havos pilieron en la markolo, kies larĝeco estas unu kilometro. La ponto pendos per du kablegoj; ĉiu el ili konsistos el 11 200 metalfadenoj. La turoj, kiuj subtenos la kablegojn, havos distancon de 1074 metroj. La konstruado de la interkontinenta pontego ĉe Istambulo finiĝos en 1973 jaro.

MENSOGULOJ

Foje kunvenis kvar viroj, grandaj majstroj de la mensogado.

— Ĉu vi aŭdis? — komencis la unua. — Mi estis en teatro. Pro pleneco oni aplaŭdis ne en horizontala direkto, sed nur en vertikala.

— Tio estas kredebla, — aldonis la dua, — ĉar mi mem ĉeestis en teatro, kiam pro plenegeco oni ne povis ridi en horizontala direkto, sed nur en vertikala.

— Tio estas nenio, — rimarkis la

tria. — Kiam mi estis en Afriko, mi vidis negron tiel nigran, ke oni devis bruligi kandelon por vidi lin.

— Jes, jes, — diris la kvara. — En Anglio mi vidis fraŭlinon, kiu pro maldikeco devis dufoje veni en la ĉambron, por ke oni povu ekvidi ŝin.

M. Solovjov

LA PLEJ GRANDA MUZEO

La plej granda muzeo de la mondo troviĝas en la Vintra Palaco de Leningrad. Tio estas „Ermitaĵ“. Por viziti ĉiujn 322 halojn de tiu ĉi unika muzeo necesas marŝi 25 kilometrojn. Ĝi entenas ĉirkaŭ 3 milionojn da artverkoj.

LA PLEJ MALLONGA LETERO

La plej mallonga letero en la mondo skribis Victor Hugo (Viktor Jugo). Kun la manuskripto de sia fama romano „La mizeruloj“ li sendis al la eldonisto leteron kun la sekva enhavo:

— ?

La respondo estis tiel same mallonga:

— !

Ni recenzas

ROZBUKEDO AL PEREINTOJ

„Septembro estiĝos majo!“ Literatura kajero. Kompilis Nano Kjuĉukov. Redaktis Asen Ĝrigorov. Stencilita eldonaĵo de Bulgara Esperantista Asocio, grandformata, 72-paĝa, Sofio, 1973.

Pri la grandioza kontraŭfaŝista ribelo de la bulgara popolo en septembro 1923 ni ĉiuj bone scias. Tamen kiel ĝi estas spegulita en la bulgara artiliteraturo ni scias malmulte. Jen kial la Kulturkleriga Komisiono de CK de Bulgara E-Asocio faris tre bonan kontribuon, eldoninte kolekton de Esperantaj tradukoj el

la bulgara literaturo pri la popola leviĝo sub titolo „Septembro estiĝos majo“.

La kajero malkovriĝas per malgranda antaŭparolo, ankaŭ per vortoj pri la celebrata evento fare de la gvidanto de la Ribelo, la heroo de Leipzig Georgi Dimitrov, kaj de la unua sekretario de BKP Todor Ĵivkov.



Sekvas la flama poemo de Geo Milev „Septembro“, verkita en 1924, tuj post la Ribelo. Jam tiam la Parlio sagace antaŭvidis, ke „septembro estiĝos majo“, kiel diras la poeto mem.

Tre bonŝanca estas la fragmento el romano „Septembruloj“ de Emil Koralov (traduko de I. Kuŝovaliev), kiu reliefe vidigas la spiriton, la volon de la bulgara popolo, la danĝeran situacion de la momento kaj la kolosan figuron de Georgi Dimitrov.

En la rakonto de Ljudmil Stojanov „La fino de l' Soveta Respubliko de Lakavica“ (esperantigis L. Raeva) kaj en la fragmento el la romano „Vilaĝo Borovo“ de Krum Velkov (traduko de St. Sokolov) ni vidas, preskaŭ palpas la brile pentritajn simplajn, senrangajn popolanojn, malriĉulojn, kiuj torturite de la monarka-faŝista reĝimo prenas la fusilojn enmane — Ignat, Marin, Jordan kaj aliaj, kiuj ĉiam estas pretaj abnegacie oferi sian vivon en batalo por socia justeco, por la sankta afero de l'popolo.

Kaj jen estas la fortega figuro de popo

Andreo el la samnoma rakonto de Angel Karalijčev (tradukis D. Simeonov). Kiam la popola heroo estis pendigata de la bestigintaj faŝistoj, aŭdiĝis la krioj de la perforte kunpelitaj vilaĝanoj: „Vera Apostolo! Levski!“

Verve verkita estas la septembra balado „Nikodim“ de Krum Kjuljavkov, ankaŭ la poemoj de Nikolaj Ĥrelkov kaj Nikola Lankov.

Vomigajn murdistojn, tute ebriiĝintajn de la popola sango, ni vidas en la fragmento el la romano „Rondodanco“ de Anton Straŝimirov (verkita en 1926). La hodiaŭaj ĉiliaj puĝistoj, la goriloj Pinoĉet kaj liaj helpantoj nun ripetigas la bulgarajn faŝistojn kaj strebas superi ilin. Sed ĉie kaj ĉiam la faŝistoj ne komprenas, ke eĉ per plej kruela sanga teroro ne estas eble haltigi la radon de la historio. Ankaŭ post Septembro en Ĉilio sekvos la popola Majo!

La kolekto estas bela rozbukedo al la monumento de tiuj, kiuj oferis sian vivon en septembro 1923 en Bulgario.

Jakov Vlasov, USSR

deziras korespondi

Bulgario

Kristina Penkova Krâsteva — str. Laĝenska 7. *Ajtos* (18-jara lernantino — kun ĉi pri ĉi).

Dobri Gorov — *Barakovo, Kjustendilsko* (pri ĉi kun ĉi).

Dimitr Kânčev, B. T. R. „Tekstilmash“, *Sliven* (interesiĝas pri religiaj temoj, pm, reciprokaj gastadoj).

Ĉeĥoslovakio

Burianek František — 51301 *Semily II*, 11458 *Myslivečka* (20-jara studento — pri lingvistiko, vojaĝoj).

Gleisner Karel — 29301 *Ml. Boleslav*, *Kominické schody 12* (20-jara studento — pri biologio, fotoj, vojaĝoj k. a.).

Fridrišek František — 73925 *Zaben* ĉ. 29, p. *Sviadnov* (38-jara teknik-majstro — pri numizmatiko).

Halamova Miloslava — 46017 *Radčice* 180, o. *Loberec* (18-jara studentino — pri literaturo, sporto, dancoj, kuirarto k. a.).

Hadkova Vladimira — 41213 *Bozkov* 221 (22-jara flegistino — bk, turismo, muziko k. a.).

Hezina Frant — 39601 *Humpolec*, „Na skalice“ 964 (52-jara laboristo — literaturo, historio, numizmatiko, piedpilko).

Hungario

Emilia Dávid — 4200 *Hajduszoboszló*, *Attila u. 29 sz.* (16-jara knabino — kun bulgaraj geknaboj).

László Hornyk — 4200 *Hajduszoboszló*, *Boeshay u. 29, sz.* (16-jara knabo — kun bulgaraj geknaboj).

Mongolio

B. Enĥbator — *Ulan Bator*, Centra Poŝtejo, poŝtkesto 919 (studento de pedagogio, sportisto-kuristo — pri ĉi, interŝanĝas bk, pm, gram. diskojn).

Pollando

Tri junaj polinoj deziras korespondi kun gebulgaroj. Interesiĝas pri muziko, literaturo, sporto: Alicja Bajek—58—310 *Szezawno-Zdrój*, ul. *Obr. Westerplatte 2/5*, woj. *Wrocław*; Katarzyna Pilat — 58—310 *Szezawno-Zdrój*, ul. *J. Marzelewskiego 18*, woj. *Wrocław*; Halina

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Marin BÂCEV, Asen GRIGOROV, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Ivan SARAFOV, Angel TODOROV, Stefka ĤRISTOVA.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Szuda — 58—304 Walbrzych 6, ul. Obr. Pokoju 31/2, woj. Wrocław.

Gregor Scheffieks — str. Szymanovskiego 29, PL — 59—900 *Zgorielec* — (kun ĉl pri turismo, motorizo, moderna muziko, interŝanĝas pm, bk, flagetojn de urboj).

Wojciech Milenski — 88—140 *Gniewkoho*, Osiedle 700 lecia 2/9 (26-jara — kolektas pm, kovertajn, bk, monerojn).

Zbigniew Fryczkowski — ul. Poznańska 11/5, 72—600 *Świnoujście* 1 (18-jara junulo — pri ĉt kun bulgaraj junulinoj).

Longina Włodarska — 58—540 *Karpač*, ul. Brzcie Karkonoskie 10 (17-jara lernantino — kun ĉl pri lit-ro, moderna muziko, modrevuoj, gram. diskoj, bk).

Milek Riczard — ul. Sepa Sarzynskiego 45 m 19, *Wrocław* (19-jara studento — kun ĉl pri ĉt).

Cienich Riczard — ul. Liskego 3 m 4, 50—345, *Wrocław* (22-jara studento — kun ĉl pri ĉt).

Przystas Josef — 33—340 *St. Sacz*, Daszynskiego 16 (18-jara lernanto — pri geografio, lit-ro, filatelo).

Urszula Woźniak — *Leszna Gorna* 119, 43—440 Golezów, pow. Cieszyn, woj. Katowice (19-jara fraŭlino — kun gejunuloj pri fotoj de kantistoj, bk).

Rumanio

Lingvistoj kaj aliaj sciencistoj estas petataj kunlabori al prof. N. V. Bulencea finverki libron pri la internaciaj lingvoj. Li ankoraŭ bezonas iujn informojn, kiuj ne estas troveblaj en la rumanaj bibliotekoj. Do, kontaktu kun li je adreso: Prof. N. V. Bulencea, Bd. N. Balcescu 3, *Bucuresti*.

Sovetunio

Zigis Polaks — str. Stranta 59, *Riga* 35, Latvio (22-jara ŝoforo — kun ĉl, interŝanĝas insignojn, emblemojn, sondiskojn ka).

Stasys Raulinai — 234 431 *Skirsnemunies p.* Jurbarko r., Litovio (18-jara studento — pri E-movado, turismo, filmoj).

Junaj estonaj esperantistoj dez. korespondi kun ĉiuj landoj kaj interŝanĝi bk, pm, gram. diskojn ktp:

Enn Malsup — Olustvere teknikuni, 8—8, *Viljandi* raj. (lernanto en la 11-a klaso — kun ĉl pri ĉt).

Ando Reinpuu — *Viljandi*, str. Ilmarise, 18—3-a (lernanto en 8 klaso).

Mare Lill — *Viljandi* raj., „Lembitu“ kolhoos (lernantino de 8 klaso).

Alvo Türisaar — *Viljandi* raj., Olustvere tehnikum (lernanto).

Epp Jürgenson — *Viljandi*, str. Leda 32 (lernantino de 6 klaso).

Genadij Redin — *Saraktaš* 462120, Orenburgskaja obl., Stepnaja 35 (21-jara fraŭlo — kun ĉl pri ĉt).

Daraganaitei Irenaj, Prano — *Vilnius* 232 015, Raud. Armijos pr. 19-6, Litovio (kun ĉl pri ĉt) Brogaite Birute — *Vilnius* 232 043, Arhitektu 72—5 (16-jara lernantino — kun ĉl pri ĉt, bk, pm).

Suško Aleksandro — *Tajkos* pr. 10—49, 235 800 *Klaipeda*, Litovio (17-jara lernanto — kun ĉl pri ĉt).

Dautova Guzel — *Išimbaj*, ul. Sovetskaja 60/12, kv. 5, *Baškiri* (18-jara oficistino — kun ĉl pri ĉt).

Irena Zemgulyte — str. Pedminu 4—46, *Klaipeda* 235 811, Litovio (17-jara lernantino — pri muziko, sporto, filmoj, bk, pm).

La klubo de Internacia Amikeco pere de sia E-rondeto en speciala lernejo por infanoj kun postsekvoj de poliemielito kaj cerebrala paralizo proponas seriozan kaj daŭran interkorespondadon kaj interŝanĝon kun lernejoj el ĉiuj landoj, precipe kun specialaj lernejoj por malsanaj infanoj aŭ por infanoj kun postsekvoj de malsanoj. Ankaŭ 10 lernantoj, kiuj studas Esperanton, proponas personan interkorespondadon. Adreso: 310 082 *Ĥarkov* 82, Ukrainio, Mejlauka 8, Ŝkola-internat Nr. 8, KID, Esperanto-rondeto.

NEKROLOGOJ

En majo ĉ. j. mortis 79-jara en Gorna Orjaĥovica

PETR PETROV MARKOV

unu el la iniciatintoj de la Esperanto-movado en la urbo. Ekde la juneco la tutan sian vivon li modeste, sed fidele kaj obstine laboris por Esperanto, por la idealoj de paco kaj amikeco inter la popoloj.

Ni kondolencas al liaj proksimuloj!

MORTIS NINA SULJE

Nina Sulje estis malnova pionirino de la soveta Esperanto-movado, membro de la Soveta MEM-Komitato kaj prezidantino de ĝia Virina Komisiono. Ŝi scipovis multajn fremdajn lingvojn, tamen arde amis Esperanton kaj siajn geamikojn esperantistojn el multaj landoj de la mondo.

Alte kultura virino, travivinta la teruraĵon de la lasta detrua milito, N. Sulje sindone kaj arde laboris por konservo de la paco kaj sukcese utiligis Esperanton, kiun ŝi perfekte posedis.

Per ŝia forpaso la soveta E-movado perdis unu el siaj plej sindonaj agantoj. Eliris el la vicoj de la Mondpaca E-Movado unu hela figuro, unu sindona arda pacbatalantino, kies laboro restas kiel bonega ekzemplo por ni ĉiuj.

